Annette von Droste-Hülshoff,

# La printempo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Plej bela tempo estas la
Printemp'. Ĉu io pli?
En ora la sunbrilo ja
Floradas ĉio ĉi.

Fandiĝas lasta neĝo jen ,
Jam verdas ĉie ci.
Briletas la lageto en
Printempa sunradi'.

La birdoj kantas en la val',
Jen krias la pirol'!
Nun venas kara najtingal'
Kaj ankaŭ la kukol'.

Jubilo-plenas la aer',
Kunkantas ankaŭ mi:
Plej bela estas primaver'!
Ĉu io bela pli?

*Traduko de la Germana poemo "Der Frühling" de* Annette von Droste-Hülshoff *(∗1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2011-04.*

*MR-523-1 / Arg-849-1714 (2013-02-28 19:22:38)*